

PERSPEKTIVO POR LA NUNA JARO

Sac. Willi Studer, paroĥestro en Ramsen, Svislando, en sia artikolo eliras el objektiva konstato de stato de la kredo kaj al pravaj antaŭtimoj, baziĝitaj je faktoj, li respondas per vortoj de la Sankta Skribo. Tiel kun realismo de la kredo evangelie fiksita li helpas krei ĝustan katolikan vidpunkton rilate al atendado, profetaĵoj (eĉ elreviĝoj) inspirititaj per dislimo de la jarmilo.

KION ALPORTOS LA JARO 2013?

Prognozoj povas kaŭzi antaŭtimojn, aŭ estigi esperon

Certaj tendencoj evidentiĝas jam dum jardekoj kaj ili estas komprenataj diverse laŭ spirita profilo. Kiel plu evoluos la situacio en Eŭropo? Kiel katolika sacerdoto mi volas direktigi atenton al religia temo: Kiel evoluos situacio en la religio kaj en la katolika eklezio en proksima estonteco? Ĉe tio signifas unu jaro nur tre mallongan periodon. Mi eliras el la demando, kiun al si metas multaj interlektaj skeptikuloj:

ĈU NI STARAS ANTAŬ FINO DE LA KRISTANA EŬROPO?

Faktoj: Kiel montras nova statistiko, kreskas nombro da eligoj el la eklezio en germane parolantaj landoj – en Germanio, Aŭstrio kaj Svislando. La kaŭzoj de la eligoj estas, laŭŝajne, honestaj kaj kompreneblaj. Estas citataj diversaj motivoj – veraj aŭ subŝovitaj. Temas pri sacerdotaj skandaloj, al la eklezio estas riproĉite, ke ĝi ne estas freŝtempa, aktuala. Multaj, kiuj eluzas servojn de la eklezio nur malofte, opinias la eklezian imposton ne plu rajtigitan. Propra, pli profunda motivo plej ofte restas prisilentata. Por plimulto de tiuj, kiuj forlasas la eklezion, la religia bazo de la katolika kredo tute malaperis.

Membroj de la eklezio, kiuj estas ekstere

Eĉ se la katolikoj ne forlasas la eklezian instituton pro motivoj laboraj, familiaj kaj sociaj, sed ili dubigas fundamentajn ekleziajn dogmojn (virginan akuŝon, resurekton de Kristo, ĉeeston de Kristo en Eŭkaristio) kaj ili rezolute rifuzas la katolikan moralan in-

struon, tiam ilia aparteneco al la katolika eklezio estas tre dubinda. Ĉu la romkatolika eklezio en Eŭropo ankoraŭ pli malgrandiĝos?

Jesuo mem metas strangan demandon

„Kiam venos la Sinjoro, ĉu li ankoraŭ trovos kredon sur la tero?“ (Luk 18,8) Eblas meti la demandon precipe en la okcidenta mondo, kiel aspektos estonteco de la romkatolika eklezio, ĉar la katolika kredo la modernan socion ne plu influigas. En Eŭropo kaj Usono ekzistas sociaj grupoj, kiuj la katolikan eklezion agresive rifuzas kaj ankaŭ ĝin atakas.

Ne fariĝu mense skueblaj!

Sankta Paŭlo profetas en 2-a Epistolo al Tesalonikanoj, en fama 2-a ĉapitro, kiel ni ekstaru fronte al la estonteco. Neniu konas nek tagon, nek horon de la nova alveno de Kristo. Mi citas: „Koncerne la alvenon de nia Sinjoro Jesuo Kristo..., ni petas vin, fratoj, ke vi ne fariĝu facile skueblaj mense, kaj ne konsterniĝu, ĉu per spirito, aŭ per parolo, aŭ per letero ŝajne de ni, kvazaŭ la tago de la Sinjoro jam apudestus.“ (2 Tes 2,1-2)

Apostateco

„Neniu vin trompu iamaniere, ĉar nepre antaŭe okazos la apostateco, kaj la homo de peko malkaŝiĝos, la filo de pereco, kiu kontraŭmetas sin kaj levas sin super ĉion, kion oni nomas Dio aŭ adoras, tiel, ke li sidas en la templo de Dio, elmontrante sin, kvazaŭ li estas Dio.“ (2 Tes 2,3-4)

Malgranda grego

Jesuo parolas pri „malgranda grego“ kaj li aldonas al tio: „Ne timu, malgranda grego, ĉar bone plaĉis al la Patro doni al vi la regnon.“ (Luk 12,32)

LA KREDO DENOVE EKFLOROS

La Eklezio kiel mistera korpo de Kristo restos vitala

Jesuo kaj lia mortofero estas en la eklezio vive ĉeestanta. Multaj vivaj membroj de la eklezio mortos kiel sangaj atestantoj kaj fariĝos semoj de la novaj kredantoj. Ni spertos Dian amon kaj proksimecon precipe en mistero de la sankta meso. Ĝi estas la mistero de nia kredo, kiu fortigas kaj konsolas persekutatan eklezion. Kiu ekkonis la eklezion kiel „misteran korpon de Kristo“, tiu neniam forlasos la eklezion, eĉ se la cirkonstancoj por lia vivo estus ankoraŭ pli endanĝeritaj.

La kredanta kristano memorigos al si la vortojn de Jesuo Kristo por adiaŭo: „Se la mondo malamas vin, vi scias, ke ĝi malamis min pli frue, ol vin. Se vi estus el la mondo, la mondo amus siajn proprajn, sed ĉar vi ne estas el la mondo, kaj mi elektis vin for de la mondo, tial la mondo vin malamas.“ (Joh 15,18-19)

Sperto de atestantoj de la sango

„Tion, kion okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis, kaj kio en la koron de homo ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas.“ (1 Kor 2,9)

La kredo estas donaco de la graco. Paŭlo diris el propra sperto al Korintanoj: „Sed la natura homo ne akceptas la aferojn de la Spirito de Dio, ĉar ili estas por li malsaĝeco kaj li ne povas ilin scii, pro tio, ke ili estas juĝataj spirite.“ (1 Kor 2,14)

En Apokalipso de sankta Johano estas anoncata fina estonteco. „Kaj mi vidis novan ĉielon kaj novan teron, ĉar la unua ĉielo kaj la unua tero forpasis, kaj la maro jam ne ekzistis. Kaj mi vidis la sanktan urbon, novan Jerusalemon, malsuprenirantan el la ĉielo for de Dio, pretigitan kiel fianĉino, ornamita por sia edzo.“ (Apo 21,1-2)

„Kaj mi aŭdis grandan voĉon el la trono, dirantan: Jen la tabernaklo de Dio estas kun la homoj, kaj Li loĝos kun ili, kaj ili estos

Liaj popoloj, kaj Dio mem estos kun ili kaj estos ilia Dio; kaj Li forviŝos ĉiun larmon el iliaj okuloj: kaj la morto jam ne ekzistos, ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro, la unuaj aferoj forpasis.“ (Apo 21,3-4)
„La venkanto heredos ĉion, kaj Mi estos por li Dio, kaj li estos por Mi filo.“ (Apo 21,7)

En la mondo forpuŝita kaj malrespektata, kaj tamen ankrita en la kredo

La kredanta kristano sentas kaj spertas, ke surteraj valoraĵoj kaj ĉiuj ideologioj estas tre pasemaj. Jesuo avertas siajn disĉiplojn, ke ili lasu sin pridonaci per nepasema trezoro, „havigu por vi... trezoron ne mankontan en la ĉielo, kie ŝtelisto ne alproksimiĝas kaj tineo ne detruas. Ĉar kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro.“ (Luk 12,33-34)

La surteran mondon kompreni kristanece

Dio amas la mondon! „Jes, Dio tiel amis la mondon, ke li sendis sian solenaskitan Filon, por nin savi.“ Ĉiu kristano devas en ĝusta senco unuiĝi kun la mondo. La mondon „venki“ signifas reveni al genezo de la mondo.

En la unua epistolo la evangelisto Johano nin kuraĝigas, ke ni ekkredu je venko de Kristo kontraŭ lia amata mondo spite de ĉiuj malfacilaĵoj.

„Ĉar ĉio, kio el Dio naskiĝis, venkas la mondon; kaj jen estas la venko venkinta la mondon: nia fido. Kaj kiu estas la venkanto de la mondo, krom tiu, kiu kredas, ke Jesuo estas la Filo de Dio?“ (1 Joh 5,4-5)

Kio okazos en „lasta epoko“?

Sciavida demando pri dua alveno de Kristo. Tio ne estas via afero! „Ili do, kunveninte, demandis lin, dirante: Sinjoro, ĉu en ĉi tiu tempo vi restarigas la regadon al Izrael? Kaj li diris al ili: Ne apartenas al vi scii tempojn aŭ epokojn, kiujn la Patro rezervas en Sia aŭtoritato. Sed vi ricevos povon, kiam la Sankta Spirito venos sur vin, kaj vi estos miaj atestantoj en Jerusalemo kaj en la

tuta Judujo kaj Samario kaj ĝis la plej malproksima parto de la tero. (Ago 1,6-8)

Konstanta „lasta epoko“

Lasta epoko komenciĝis jam kun Jesuo Kristo. Kiu sekvas Jesuon, ricevos ankaŭ lian sorton kaj li devus pro tio ĝoji.

En Surmonta Prediko Jesuo diras: „Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos kaj persekutos kaj false vin kalumnios pro mi. Ĝoju kaj raviĝu, ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo.“ (Mat 5,11-12)

Venki kontraŭ malamo per la amo de Ŝafido

„Jen mi forsendas vin kiel ŝafojn meze de lupoj!“ (Mat 10,16) „Sed kiam ili transdonos vin, ne zorgu, kiel aŭ kion vi parolos, ĉar estos donita al vi en tiu horo tio, kion vi parolos. Ĉar parolas ne vi, sed la Spirito de via Patro parolas en vi.“ (Mat 10,19-20)

Eklezia sesio

Kio povas kaŭzi disfendon? Kion por ĝin venki?

1. Personkulto

Skismoj povas havi devenon en falsa personkulto. „Mi estas de Paŭlo, kaj mi de Apolos, kaj mi de Kefas.“ Paŭlo demandas: „Ĉu Kristo estas dividita?“ (komp. 1 Kor 1,12-13)

2. Antikristoj

Ili estis ĉiam „interne“ de la eklezio. La evengelisto Johano diras: „De ni ili eliris, sed ili ne estis el ni, sed se ili el ni estus, ili restus ĉe ni.“ (1 Joh 2,19)

3. Hipokrituloj

Jesuo kondamnas precipe hipokritulojn. Fine de sia Surmonta Prediko Jesuo diras: „Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo!“

„Multaj diros al mi en tiu tago: Sinjoro, Sinjoro, ĉu ni en via nomo ne faris multajn potencaĵojn? Kaj tiam mi konfesos al ili: Mi neniam konis vin, foriĝu de mi, vi farantoj de maljusteco!“ (Mat 7,21-23)

4. Drako kaj besto

„Drako donis al besto sian potencon kaj sian tronon kaj grandan aŭtoritaton.“ (Apo 13,2)

„La tuta tero miris post la besto. Ili adorkliniĝis al la drako, ĉar ĝi donis sian aŭtoritaton al la besto, kaj ili adorkliniĝis al la besto, dirante: Kiu estas simila al la besto kaj kiu povas militi kontraŭ ĝi? (...) Kaj ĝi malfermis la buŝon por blasfemoj kontraŭ Dio, (...) kaj kontraŭ la loĝantojn de la ĉielo. Kaj estis donite al ĝi fari militon kontraŭ la kristanoj, kaj venki ilin. Kaj estis donita al ĝi aŭtoritato sur ĉiu tribo kaj popolo kaj lingvo kaj nacio. Kaj adorkliniĝos al ĝi ĉiuj loĝantoj de la tero, kies nomo ne estas skribita en la libro de vivo, libro de la oferita Ŝafido.“ (Ago 13,3-8)

5. Venko de la amo

„Kiam la apostato aperos, restu firmaj!“ – „Se iu malliberigas, en malliberecon li iras; se iu per la glavo mortigos, li devas per la glavo esti mortigita. Ĉi tie estas la pacienco kaj la fido de la kristanoj.“ (Apo 13,10)

„Tiuĵ militos kontraŭ la Ŝafido, kaj la Ŝafido venkos ilin“ kaj en tiu venko partoprenos ankaŭ „tiuj, kiuj estas kun li, vokitaj kaj elektitaj kaj fidelaj.“ (Ago 17,14)

6. Falsa profeto

„Kaj la besto (satano) estis kaptita kaj kun ĝi la falsa profeto.“ – „Ili ambaŭ estis jetitaj vivaj en la lagon fajran, brulantan per sulfuro.“ (Apo 19,20) La homoj, kiuj sekvas mensogojn de la satano, mem al si baris aliron al la eterna vivo per sia egoismo.

„Ekstere restos cinikuloj, mortigistoj kaj idoloj kaj ĉiuj, kiuj inklinas al farado de malbono.“ (Apo 22,15)

7. Proksimeco kaj distanco

Ni povas konstante sperti proksimecon de Dio. Jakobo al ni vokas: „Alproksimiĝu al Dio, kaj Li alproksimiĝos al vi.“ (Jak 4,8) – „Nun mi vin petas, fratoj, observi tiujn, kiuj kaŭzas la malkonsentojn kaj ofendojn kontraŭ la instruado, kiun vi lernis; kaj for-

turni vin de ili. Ĉar tiaj homoj servas ne al nia Sinjoro Kristo, kaj per siaj belaj kaj flataj vortoj ili trompas la korojn de la naivuloj.“ (Rom 16,17-18)

8. Fideleco al transdonita kredo

Paŭlo skribas al Tesalonikanoj: „Tial, fratoj, staru firme, kaj tenu la tradiciojn,

kiujn vi lernis ĉu per parolo, aŭ per ia letero nia. Nia Sinjoro Jesuo Kristo mem, kaj Dio, nia Patro, kiu nin amis kaj al ni donis eternan konsolon... , konsolu viajn korojn kaj fortigu ilin por ĉia bona faro kaj vorto.“ (2 Tes 2,15-17) ■

*El Schweizerisches Katholisches
Sonntagsblatt 1/2013*